

Ĉu vi parolas solresole?



Protesto kanzona

Vintra banado

**Politika
sukceso,
scienca fiasko**

Edwin de Kock

Sub Fremdaj Ĉieloĵ

“Nekutime leginda verko”

Donald Broadribb



Ne nur poezio estas en la libro ... enestas, kompreneble, liaj “Lastaj poemoj” sed ne malmultaj scios ke post tiuj “lastaj” li jam verkis sufiĉe multe da postlastaj, kaj iuj el inter tiuj ankaŭ estas troveblaj en tiu ĉi honora kompilaĵo. Tre legindaj estas i.a. nepre la eseoj pri la historio de Esperanto en Sud-Afriko, pri la memorindaj personoj kiujn Edwin renkontis en kaj ekster la verda mondo.

Sed... prefere malkovru mem!

Paĝoj: 288; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008

Serio Stafeto n-ro: 32

Pezo: 333 g

ISBN: 978-90-77066-33-1

Prezo ĉe FEL: 22,50 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Politika sukceso, scienca fiasko

7



Fine de novembro 2008 astronautino de la Internacia Spaco-Stacio (ISS) dum ekstera riparado perdis ilar-sakon, kiu nun ŝvebas kiel aparta sateliteto tra la spaco, ĉiam kelkajn minutojnantaŭ ISS. Kompreneble la kutimaj mokantoj komentis: Klare, ke ino perdis sian saketon ... Kiel ajn, amaskomunikiloj raportis pri ISS, same kiel kelkan tempon antaŭe pri difektita neceso en la stacio.

Baraktas fiŝistoj ekster la akvo

11




Strikis meze de julio miloj da japanaj fiŝistoj. Ariĝis en Tokio 3000 reprezentantoj de la fiŝistoj, postulante por sia industrio registaran subvencion.

Ĉu vi parolas solresole?

23

Solresol, la universala muzika lingvo de Jean François Sudre [ja frasuā sidr] (1787-1862). Solresol uzas alfabeton el sep simboloj, nome la sep tonojn de la baza solfeĝo, de kiuj venas ankaŭ la (parola) nomo de la lingvo (Sol-Re-Sol), ĝi malofte ricevis la atenton aŭ la respekton, kiun ĝi meritas.



politiko

LITOVIO	8
Dekstren sen entuziasmo	
ALBANIO	9
Malfeliĉa naskiĝdatreveno	
RASISMO	10
Protesto kanzona	

moderna vivo

JAPANIO	11
Baraktas fiŝistoj ekster la akvo	
JAPANIO	12
Ferioj senferiaj	
SANO	13
Ha ha – kaj aH aH	
ARTO	13
Pentri ... eble penti	
ALBANIO	13
Kreskas sinmortigoj	
BURUNDO	14
Homaj oferoj	
Rajto pri libera esprimado?	14

hobio

FINNLANDO	15
Vintra banado	

spirita vivo

KRISTANISMO	16
Paŭlo-jaro	
BIBLIO	17
Tage kaj nokte en televido	

novelo

La Helpanto	18
-------------------	----

eseo

La tulumora tombejo	20
---------------------------	----

enigmo

Libroforma enigmo	22
-------------------------	----

libroj

Ĉu vi parolas solresole?	23
Salutinda trezoreto	23
Porte(b)la Ilustrita Vortaro	24
RESPONDORAJTO	25
Mi ne estas atisto	

sporto

AFRIKO	26
Burunda futbalo profesiiĝas	

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› El mia vidpunkto.....	7
› Anoncetoj.....	27

► Rekto al la eldonejo ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono por ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- > Per bankĉeko traktita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	24	27	14,4	5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	24	27	14,4	5	9
Britio	GBP	39	42	23,4	4	7
Bulgario	EUR	26	29	15,6	5	9
Ĉeĥio	EUR	34	37	20,4	5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	40	70
Estonio	EUR	26	29	15,6	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	46	50	27,6	5	9
Grekio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hispanio	EUR	46	50	27,6	5	9
Honkongo	EUR	42	45	25,2	5	9
Hungario	HUF	6950	7750	4170	1340	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	42	45	25,2	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1460
Kanado	CAD	76	80	45,6	9	15
Kipro	EUR	34	37	20,4	5	9
Koreio	EUR	42	45	25,2	5	9
Kostariko	EUR	24	27	14,4	5	9
Kroatio	EUR	26	29	15,6	5	9
Latvio	EUR	26	29	15,6	5	9
Litovio	EUR	26	29	15,6	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	34	37	20,4	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	398	430	238,8	45	73
Nov-Zelando	NZD	105	110	63	11	19
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugalio	EUR	42	45	25,2	5	9
Rusio	EUR	24	27	14,4	5	9
Singapuro	EUR	42	45	25,2	5	9
Slovakio	EUR	26	29	15,6	5	9
Slovenio	EUR	34	37	20,4	5	9
Sud-Afriko	EUR	42	45	25,2	5	9
Svedio	SEK	466	499	279,6	49	86
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Tajvano	EUR	42	45	25,2	5	9
Usono	USD	78	82	46,8	8	14
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazila:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi.
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: novire-sp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japania:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzjuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a

- Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
- > **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr.
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvegia:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
- > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu.
- > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbecckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schledorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org.

Aĉetita mesio



Estas ne eble nuntempe ne paroli pri mono, do ni parolu pri tio, kiom kostis elekti novan prezidanton (kaj parlamentanojn) en Usono: 5,3 miliardojn da dolaroj. Tiun rekordan sumon ni dankas precipe al la nova mesio Barack Obama; li kolektis por sia kampanjo 600 milionojn da dolaroj en mondonacoj. Por aĉeti lin do ĉiu loĝanto (ne nur elektinta) de Usono teorie elspezis ĉirkaŭ 18 dolarojn. Ĉiukaze Obama estas la ĝis nun plej valora (nu ja, multekosta) prezidanto, malgraŭ tio, ke li en la lasta fazo de la kampanjo rezignis pri impostmono kaj financis ĝin sole per mondonacoj. Lia rivalo John McCain [ĝon mekĉjn] kontentis pri 84 milionoj da impost-dolaroj.

Ni restu ĉe ciferoj, ĉar ankaŭ aliaj indikoj estas nekutimaj por Usono. Ekzemple partoprenis la elektojn rekordaj 64,2 % de elektorajtulaj; el la afrik-usonanoj 95 % voĉdonis por la nigrulo Obama, kiu kolektis entute 53 % kompare al McCain kun 46 % – do diferenco de nur 7 % (aŭ 9 milionoj da voĉdonoj). Tio ŝajnas esti normala rezulto, ĉar simila estis la proporcio ankaŭ dum antaŭaj elektoj. Tamen pro la komplika usona elektosistemo Obama gajnis 365 „electors”, kiel en Usono oni nomas tiujn homojn, kiuj fine de la

procedo voĉdonas por konfirmi prezidantecon. Lia rivalo gajnis 173 finelektontojn, tiel ke Obama povos enoficiĝi la 20an de januaro 2009. Tamentiurilate Obama ne rikoltis rekordan nombron; ekzemple la patro de la nuna prezidanto, George Bush [ĝorĝ buŝ], en 1988 akiris 426 kaj la fama Ronald Reagan [rejĝen] en 1984 gajnis eĉ 525 elektontojn.

Eble tudas vin tiuj multaj ciferoj, sed ili klare montras, ke tiuj usonaj elektoj ne estis eksterordinaraj laŭ tiu kriterio. Eksterordinara estis unuflanke la terure multa mono, kiun Obama kolektis kaj elspezis por siaj kampanjaj spektakloj, aliflanke estis ja sensacio, ke por la unua fojo nigrulo iĝas usona prezidanto. Certe, Obama havas multajn avantaĝojn kompare al sia rivalo maljuna: li, multe pli juna, havas sendube karismon. Prave do oni ligas multajn esperojn kun la nova prezidanto. Sed ni estos jam kontentaj, se li estos normala registaro, tiel normala, kiel fakte estis la elektorezultoj – post la erao de Bush, la plej malbona usona prezidanto.

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

www.monato.net

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 30a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendo ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

revizianto:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Shlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vis-spaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmaj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Clevelend Heights, OH 44118, Usono.
Telefono/faksilo (216) 297-0370.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzonj oni ne sendu al la redaktoro proprajinitate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-shi, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.



La plej nova novelaro de Lena Karpunina

Neokazinta amo

kun 15 novaj rakontoj, inter kiuj kelkaj estis premiitaj.



Legintoj skribas:

“Se mi estus leginta nur unu rakonton de Lena Karpunina, mi povus konvinke aserti: la juna verkistino estas vere talenta. En stilo klara, laŭ bona tradicio de la rusa literaturo, la rakontoj pliriĉigas niajn mensojn, plibonigas niajn korojn.”



(Ignat Florian Bociort)

“Ŝia majstra talento verkista konsistas ĉefe el homa psikologio kaj kapablo prezenti eĉ la plej strangajn personojn tiel, ke la leganto akceptas kaj eĉ ekŝatas ilin. En la Esperanta literaturo tiu ŝia talento estas vere malofta.”



(Sten Johansson)

Prezo: 15 eŭroj + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendanto.

- ISBN: 90-77066-28-7
- Paĝoj: 150
- Serio Stafeto n-ro: 31

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Politika sukceso, scienca fiasko

de Stefan MAUL

Fine de novembro 2008 astronautino de la Internacia Spaco-Stacio (ISS) dum ekstera riparado perdis ilar-sakon, kiu nun ŝvebas kiel aparta satelite-to tra la spaco, ĉiam kelkajn minutojn antaŭ ISS. Kompreneble la kutimaj mokantoj komentis: Klare, ke ino perdis sian saketon ... Kiel ajn, amaskomunikiloj raportis pri ISS, same kiel kelkan tempon antaŭe pri difektita necesejo en la stacio. Sed pri eksperimentoj kaj esploroj en ISS oni jam delonge legas preskaŭ nenion. Efektive la sciencistoj en la stacio estas okupataj preskaŭ nur pri riparado.

Jubileo ne festata

Fakte ĉirkaŭ tiu tempo, kiam perdiĝis la ilar-saketo, ISS povus festi sian dekjaran jubileon – sed oni tute ne festis. Kio okazis, ke la „mondmiraklo por la nova jarmilo“, la „plej granda konstruprojekto post la piramidoj“ kaj la „esplorurbo en la spaco“ degeneris al nura riparejo? Per supre menciitaj epitetoj oni gloris la stacion, kiam la zoan de novembro 1998 Rusio pafis la

unuan ISS-modulon Sarja kiel komponanton de la estonta laboratorio. Sed dek jarojn poste ĝi estas nenio alia ol konglomeraĵo de loĝkonteneroj, en kaj pri kiuj oni nur konstruas, sed praktike ne esploras aŭ eksperimentas. Tio ĝis nun kostis la gigantan sumon de 100 miliardoj da eŭroj.

Kiam oni planis la stacion, oni antaŭvidis, ke la sciencistoj en la spaco dum 27 horoj semajne eksperimentos kaj esploros; fakte intertempe estas maksimume 2,5 horoj semajne. Vartado kaj riparado de ISS bezonas dekoble tiom da tempo ol planite. Krom per malĝustaj prognozoj kaj tute nematura tekniko la astronautoj estas brem-sataj per la lama konstruprogreso. La eksplodo de la usona spacopramo Columbia antaŭ kvin jaroj definitive perturbis la tempoplanon, laŭ kiu la stacio jam delonge devus esti preta. Sed plej frue post unu-du monatoj oni povos sendi plian modulon. Ses astronautoj tiam konstante laboru en ISS – kiel planite jam por pluraj jaroj antaŭe. Nun estas nur tri sciencistoj, kiujn komplete okupas ordinaraj vartolaboroj.

Homoj superflujaj

Ĉar la spacoloĝantoj praktike ne havas tempon por eksperimentoj, oni plejparte aŭtomatigis ilin, kio nerekte provas, ke por ili oni tute ne bezonus homojn. Ili nur devas premi iujn butonojn kaj la aparatoj laboras per si mem. Do oni povus rezigni pri loĝantoj en la spaco, ĉar ĉiu sufiĉe inteligenta roboto same bone povus plenumi la taskojn. „Escepte de eksperimentoj pri la homo mem, en esplorado preskaŭ ĉiuj eksperimentoj pli bone, pli precize kaj pli malmultekoste povas esti realigitaj per senhomaj misioj“, kritikis Germana Fizika Societo jam antaŭ la starto de ISS. Ankaŭ Usono evidente perdis intereson, ĉar prezidento Bush [buŝ] favoris usonan lunprogramon, tiel ke spacorganizajo NASA devis duonigi sian buĝeton por ISS.

Eŭropo ĝis nun investis kvin miliardojn da eŭroj, pliaj kvar sekvos. Sed sciencistojn kaj koncernajn kompaniojn en Eŭropo fakte ne interesas ISS. Praktike, diras kritikantoj, la homa spacveturado esploras nur sin mem. Sed eĉ tiukampe rezultoj estas marginaj kaj nekontentigaj. Eksa NASA-esploristo Lawrence Kuznetz [laŭrenc kuznec] kritikas: „Medicinaj studaĵoj surtere ampleksas centojn aŭ milojn da individuoj, en la spaco estas nur manpleno.“ La „plibonigo de vivokvalito surtere“, per kiu NASA varbis por la projekto ankoraŭ antaŭ kelkaj monatoj, estas iluzio.

Modela kunlaboro

Dek jarojn poste ni memoru, kiel kaj kial oni iniciatis la artefaritan trabanton. La stacio, kvankam oni tiel proponis ĝin, neniam estis planita kiel nura esplorprojekto. Kiam la usona prezidento Ronald Reagan [rejgen] en 1984 komisiis NASA, evoluigi ĝin, per tio li volis superi Sovetion. Kiam prezidento Bill Clinton [klintn] invitis Rusion kunlabori, per tio li volis eviti, ke ties spacosciencistoj elmigros al malamikaj ŝtatoj. La stacio do dekomence estis precipe politika projekto. Kaj fakte, ke entute 16 ŝtatoj komune konkeras la spacon, ke ili kune ellaboris teknologian koncepton kaj juran kadron kaj spite al ĉiuj problemoj ĉiam denove kunagadas, estas sukceso kaj modelo por plia internacia kunlaborado, eĉ se laŭ scienca vidpunkto ISS estas fiasko. Por tiu politika sukceso tamen ni ĉiuj pagas tre, tre multan monon. ■



Vartado kaj riparado de ISS bezonas dekoble tiom da tempo ol planite.

LITOVIO

Dekstren sen entuziasmo



Arunas Valinskas, la estro de nova partio kaj lia edzino Inga, kiu ankaŭ fariĝis nova parlamentanino.

Novan parlamenton elektis litovoj en oktobro – kaj tiel adiaŭis la socialdemokratanoj registaron de Gediminas Kirkilas kaj salutis la konservativan de Andrius Kubilius.

Kreskinta korupto kaj troa elspezado turnis litovojn kontraŭ la socialdemokratoj. Kontraste furoris la konservativuloj, tiel ke, post okjara paŭzo, revenis la Unio de Patrujo – Kristandemokratoj de Litovio kaj gajnis 45 lokojn en la nova parlamento. La socialdemokratoj retenis 25 lokojn.

Notindas nova partio, la Partio de Nacia Leviĝo, kiun fondis televid-stelulo Arunas Valinskas. Al sia partio li allo-

gis plurajn aliajn „nomojn”: kantistojn, aktorojn kaj humoristojn. Neniu kredis je ilia sukceso, ĉar la novuloj aspektis neseriozaj kaj ricevis multajn kritikojn. Tamen la konataj televidaj vizaĝoj konvinkis multajn pri siaj politikaj talentoj, tiel ke en la nova parlamento ilia partio okupas 16 lokojn.

Koalicio

Kreiĝis do koalicio konsistanta el konservativuloj, la Partio de Nacia Leviĝo, Liberala Movado, Unio de Liberaluloj kaj la centro, kiu decidis pri la ĉefaj postenoj: Kubilius estros la re-



Andrius Kubilius iĝis la nova ĉefministro.



La partio de Arunas Valinskas (meze) prezentiĝis pli bone, ol partianoj mem supozis.



La litova parlamento.

gistarono kaj Valinskas la parlamenton.

Tamen litovoj ne multe entuziasmiĝis pri la balotoj. Por elekti la novan parlamenton partoprenis en la unua etapo 48,6 % de la popolo kaj en la dua nur 32,4 %.

La plej juna litova parlamentano nun aĝas 26 jarojn kaj la plej aĝa 72. En la nova parlamento aniĝis 26 virinoj.

LAST

Malfeliĉa naskiĝdatreveno

Celebris en oktobro nostalgio pri komunismo la 100an datrevenon de la naskiĝtago de eble la plej sovaĝa diktatoro komunisma en orienta Eŭropo. Temas pri la albano Enver Hoxha [hodĵa], kiu naskiĝis en la urbo Gjirokaster [ĝi-rokaster] en 1908 kaj mortis en Tirano en 1985.

Komunistoj planis elspezi grandan monsumon por la solenaĵoj, kaj eĉ invitis rusajn komunistojn. Tamen, indigniĝis kaj protestis tiuj, kiujn persekutis la timama reĝimo totalisma, kaj kiuj memoris la krimaron, genocidon, subpremon kaj ekspluatadon fare de la ŝtato-partio laŭ

ordonoj de la diktatoro mem.

Trafis landon kun apenaŭ pli ol miliono da loĝantoj en 1944 amasaj ekzekutoj (ĝis 6000), politikaj enprizonigoj (ĝis 1945: 10 000), koncentrejoj, devigaj laborejoj, deportejoj kaj internigejoj, kie ĝis 1991 suferis centmiloj da albanoj. Lernejoj, preĝejoj, kazernoj, fabrikoj, stadioj kaj privataj domoj transformiĝis en prizonojn, ĉar ne sufiĉis jam ekzistantaj.

Malhumanaj kondiĉoj

La kondiĉoj en la devigaj laborejoj estis tiom malbonaj kaj malhumanaj, ke oni taksis la koncentrejojn ĉe Mauthau-



PUMA

sen aŭ Dachau pli bonaj. Politikaj prizonuloj, kiuj nombris tiam 20 000, malsekigis marĉojn, konstruis tunelojn, flughavenojn, domojn kaj elektrocentralojn kaj laboris en minejoj. Dume pereis centoj da homoj.

Ribelado estis forte punata, kelkfoje per morto aŭ rekondamno. Kelkaj pasigis jardekojn en prizonoj – ĝis 45 jarojn.

Samtempe suferis ekonomie, politike, socie kaj morale la tuta lando, kiun oni taksis entute granda prizono. Pro tio abomenis multaj albanoj la celebradon de la naskiĝdatreveno de Enver Hoxha.

Bardhyl SELIMI



Enver Hoxha estis eble la plej sovaĝa komunista diktatoro en orienta Eŭropo. Nun infanoj libere ludas sur tegmento de la muzeo de Enver Hoxha.

RASISMO

Protesto kanzona

Manifestacii en la albana ĉefurbo Tirano membroj de la neregistara organizaĵo Mjaft („Sufiĉe”) okaze de vizito de la itala ministro pri eksterlandaj aferoj, Franco Frattini.

Okulfrapis sloganoj en la itala lingvo No al razzismo („Ne al rasismo”), kiuj aludis decidojn de la itala registaro kaj parlamento diskriminacii kontraŭ fremduloj, interalie per apartaj klasĉambroj por italoj kaj neitaloj.

Enmigrintoj

En Italio oficiale loĝas 400 000 alba-

LE FATELUSI



Manifestacioj kontraŭ la decioj de itala registaro okazis ne nur en Albanio sed ankaŭ en Italio.

naj enmigrintoj. Cetere Italio okupas la unuan lokon en Albanio por fremdlandaj investoj. En Tirano subskribis Frattini kvin interkonsentojn ekonomiajn, kiuj inkluzivas konstruadon de granda elektrocentralo.

Siaflanke promesis Frattini liberigi la vizo-reĝimon kun Albanio, ĉar la

lando plenumis preskaŭ ĉiujn tiurilatajn kondiĉojn. Tio ne malhelpis dum la manifestacio disaŭdigon per laŭparoliloj de la kanzono Giovinezza (Junularo) komponita en 1909 kaj kantita en Italio kaj en ties okupataj landoj, inkluzive de Albanio, ĝis la fino de la dua mondmilito.

Bardhyl SELIMI



Partoprenis ankaŭ infanoj kaj instruistoj.

JAPANIO

Baraktas fiŝistoj ekster la akvo

Strikis meze de julio miloj da japanaj fiŝistoj. Ariĝis en Tokio 3000 reprezentantoj de la fiŝistoj, postulante por sia industrio registaran subvencion. De sur podio deklaris sinjorino Hatakejama Ecuko el la gubernio Mijagi: „La prezo de nafto pli kaj pli altiĝas, sed fiŝprezoj neniam. Kotizoj por pensio kaj sanasekuro, impostoj, ĉio altiĝas. Se tiu situacio daŭros, ni ne povos vivteni nin. Helpu nin!”

Fiŝkaptado multe dependas de nafto. Ĉirkaŭ 50 % de la elspezoj de la fiŝistaro rilatas al nafto, ĉefe pro ŝipetoj. Lastatempe la kosto de nafto kvarobliĝis (de ekvivalento de 200 eŭroj ĝis pli ol 800 eŭroj por mil litroj). Tamen fiŝistoj ne povas aldoni tiun kroman elspezon al la prezoj de kaptitaj fiŝoj. La pograndistaro, havante pli da forto ol la fiŝistaro, premas prezojn por afabli al konsumantoj.

Ostetoj

Gustoj de konsumantoj pri fiŝoj ŝanĝiĝis. Ili pli ŝatas tiajn fiŝojn kiel salmo, tinuso kaj seriolo (Seriola quinqueradiata), kiujn oni povas facile kuir kaj manĝi same kiel viandon. Nuntempe homoj estas tiom okupataj, ke ili ne volas malrapide kuir kaj manĝi malgrandajn fiŝojn kun multaj ostetoj. Tamen por kapti tinusojn, fiŝistoj devas vojaĝi al malproksima maro apud Sud-Afriko.

Tial al la kunveno en Tokio venis mesaĝo de unu el tiuj fiŝistoj: „Estimata ministro, ni nun kaptas tinusojn 650 mejlojn sude de Kaburbo, Sud-Afriko, en malvarmegaj ventoj. Ni aĉetis nafton en Kaburbo en junio kontraŭ 125 000 enoj (830 eŭroj) por mil litroj, 50 000 enojn (300 eŭrojn) pli multekoste ol en januaro. Ni ŝparis kaj ŝparis, sed ni ne povas tion plu fari.”

Aviadilo

La tinusojn oni transportas per aviadilo al Japanio. Do oni moke diras, ke tinusoj, kiuj venas al Japanio, ne nur naĝas en la maro, sed ankaŭ flugas en la aero. Ankaŭ por tio oni bezonas nafton.

Ekzistas alia problemo pri japana fiŝado: maljuniĝintaj fiŝistoj. En 1984 estis 440 000 fiŝkaptistoj en Japanio, sed nun estas nur 210 000. Dum la pasintaj 20 jaroj la nombro duoniĝis, kaj 40 % de la fiŝistoj estas pli ol 65-jaraĝaj. Do pro nafto-kostoj, ŝanĝiĝantaj gustoj de konsumantoj kaj maljuniĝanta fiŝistaro la japana fiŝindustrio travivas malfacilajn tempojn.

Tamen konsumantoj ŝajne ne multe interesiĝas pri tiu problemo. En la vespera televido multas programeroj pri frandaĵoj kaj ekzemple pri „rotaci-suŝi-restoracioj”, kie oni surtabligas mal-multekostajn, sed bongustajn suŝiojn (suŝio: kruda fiŝaĵo sur



Gustoj de konsumantoj pri fiŝoj ŝanĝiĝis. Ili pli ŝatas tiajn fiŝojn kiel salmo, tinuso kaj seriolo, kiujn oni povas facile kuir kaj manĝi same kiel viandon.

rizbulo). Tie infanoj kaj gepatroj manĝas kun feliĉa mieno, tute ne sciante, kiamaniere tiuj fiŝaĵoj venas al ilia tablo.

HORI Jasuo



Homoj manĝas fiŝojn kun feliĉa mieno, tute ne sciante, kiamaniere tiuj fiŝaĵoj venas al ilia tablo.

Ferioj senferiaj

Kiel lernantoj pasigas someran libe-
ran tempon? En Japanio la lerneja jaro
komenciĝas en aprilo kaj la unua ler-
nosezono finiĝas ĉirkaŭ la 21a de julio.
Somera libertempo ĝenerale daŭros dum
40 tagoj ĝis la fino de aŭgusto.

Kion nunaj lernantoj faras? Multaj
lernas en privata lernejo por kompensi
la nesufiĉan lernadon en la lernejo.
Multaj partoprenas en sporta trejnado
organizita de lerneja aŭ loka kluboj. En
aŭgusto multaj vizitas geavojn, akompa-
nate de la gepatroj. Fine de la monato
multaj haste finas somerajn lerneajn
hejmtaskojn.

Tamen en kelkaj urboj lernantoj ne
povas havi 40-tagan libertempon. Antaŭ
du jaroj edukaj komitatoj mallongigis je
unu semajno la someran libertempon.
Laŭ la ĵurnalo Asahi 10 % de la edukaj
komitatoj en Japanio respondas jese al la
demando pri mallongigo. Ili celas mul-
tigi lernohorojn, ĉar en 2002 komenciĝis
edukado laŭ nova gvidlinio kaj lernoho-
roj malmultiĝis.

Ŝarĝo

Tio maltrankviligis gepatrojn, kiuj
kritikis la ministerion pri edukado. La
ministerio konsentis reformi la gvid-
linion, kaj venontjare en element- kaj
mez-lernejoj plimultiĝos lernohoroj.
Edukaj komitatoj, kiuj prove kaj antici-
pe mallongigis la someran libertempon,
pravigis sin, dirante, ke ili celas eviti tro
da ŝarĝo al lernantoj.

Tamen enketite, 75,5 % de mezler-
nejanoj kaj 43,0 % de elementlernejanoj
respondis, ke mallongigo de la ferioj tute
ne estas bona. Venas kritikoj ankaŭ de
gepatroj: „Lernantoj ne povas partopreni
en sporta trejnado”, „Lernantoj ne kom-
prenas, kial ili devas iri al lernejo, dum
iliaj gefratoj en supera mezlernejo ferias
hejme”, „Somera libertempo donas al



„Lernantoj ne komprenas, kial ili devas iri al lernejo, dum iliaj gefratoj en supera mezlernejo ferias hejme”

lernantoj ŝancon pasigi tempon laŭplaĉe
kun siaj familianoj kaj en la naturo” ktp
(laŭ la ĵurnalo Asahi).

Instruistoj

Dume, kiel instruistoj pasigas so-
meran libertempon? Kiam mi fariĝis in-
struisto en supera mezlernejo en 1965,
ankaŭ instruistoj feriiis. Tamen en 1970aj
jaroj la situacio pli kaj pli ŝanĝiĝis. La
eduka komitato en mia gubernio ekargu-
mentis, ke libertempo dum somero kaj
vintro estas por lernantoj, sed ne por in-
struistoj, ĉar tiuj ricevas salajron. Kiam
mi eksiĝis kiel instruisto antaŭ 15 jaroj,
mi ne rajtis ferii dum somero.

Tamen la nuna situacio estas malpli
bona. Eĉ antaŭe instruistoj devis havi
specialan kurson dum somero aŭ ali-
tempe en la 1a, 3a, 5a, 10a, 15a, 20a jaro
post instruistiĝo. Nun krom tiuj kursoj,
instruistoj devas havi 30 lecionojn en
universitato en ĉiu 10a jaro por renovigi

sian instruistan kvalifikon.

Dumvive valida

Antaŭe tiu kvalifiko estis dumvive
valida, sed lastan union la regantaj par-
tioj limigis la validperiodon de la kvali-
fiko al 10 jaroj, pretekstante, ke ĝi eks-
kludu malbonkvalitajn instruistojn. Mi
tamen opinias, ke ĝia vera intenco estas
ekskludi politike aktivajn, sindikatanajn
instruistojn, por ke edukado servu ne al
la popolo sed ankaŭ al la ŝtato.

Ĉi-jare 118 universitatoj organizis
kursojn, en kiuj instruistoj ricevas 12 le-
cionojn pri eduka politiko kaj 18 lecio-
nojn pri sia fako. Ĉiun jaron 100 000 in-
struistoj ĉeestos tiujn kursojn, do ankaŭ
universitataj instruistoj devas multe la-
bori dum la somero. Kion naskas oku-
pita libertempo al Japanio? Pli klerajn
lernantojn kaj instruistojn, kaj pli gloran
Japanion? Eble ne.

HORI JASUO



CAPR. MADD HATT

SANO

Ha ha – kaj aH aH



GREEKADIAN

Profesoro Kimura Jooji inventis porteblan ridmezurilon, kiun ĝis la fino de la jaro li povos vendi.

Estas bone konate, ke ridoj malmultigas mensajn streĉojn kaj fortigas korpan imunecon. Tamen, por

sano, kiom da ridoj necesas? Profesoro Kimura Jooji de la Kansaja Universitato, Japanio, komencis esplori la sekreton de ridoj.

Ĝis nun oni atentis nur mienojn kaj voĉojn de ridantoj, sed Kimura esploris la movojn de la diafragmo. En eksperimento li trovis, ke, kiam oni elkore ridas, nur la diafragmo tremas. Profitante tiun eltrovon, li inventis porteblan ridmezurilon, kiun ĝis la fino de la jaro li povos vendi.

Li diras: „Multaj homoj estas tro konsciaj pri sia sano, prenante medikamentojn kaj maltrankviliĝante pro sangopremo kaj glukozo.”

Tamen ne tiajn aferojn oni mezuru, sed ridkvanton. Laŭ la profesoro oni diru al si: „Aha, hodiaŭ ankoraŭ mankas 500 aH (unu de ridoj) al mi. Mi ĝuu tradiciajn komikajn rakontojn kaj ridu.” Tiel, opinias Kimura, nepras vivi.

HORI Jasuo

ARTO

Pentri ... eble penti

Antaŭ nelonge en la albana ĉemara urbo Durrës estas malfermita ekspozicio pri pentraĵoj de nekonata artisto. Temis pri 23-jara albana elmigrinto al Italio, kiu tie estis dumvive enprizonigita pro murdo. En la prizono vekigis lia talento pri pentrado.

Konsultinte kun sia fratino, li decidis sin dediĉi al pentrado. Rezulte aperis kelkaj dekoj da verkaĵoj tiel artismaj, ke lia naskiĝurbo konsentis starigi ekspozicion. La publiko ege ŝatis la pentraĵojn, kiuj spegulas ne nur prizonan vivon sed ankaŭ, kaj ĉefe, eksterprizonan ekziston, aparte la gajecon de la naturo kaj de la homa vivo.

Bardhyl SELIMI

ALBANIO

Kreskas sinmortigoj

Lastajn jarojn plimultiĝis sinmortigoj en Albanio. Dum la pasintaj ok monatoj pereis propramane 90 personoj. Statistike sinmortigoj okupas la trian lokon el 17 mortokaŭzoj, tuj post trafik-akcidentoj. Mortigas sin ĉefe viroj inter 19 kaj 45 jaroj. Tamen konstateblas sinmortigoj ankaŭ ĉe adoleskoj kaj pli aĝaj albanoj.

Bardhyl SELIMI

BURUNDO

Homaj oferoj

Murdis sesjaran albinan knabinon en Ruyigi, orienta provinco de Burundo, malbonuloj armitaj per pafiloj. Post la murdo ili detranĉis ŝian kapon, brakojn kaj gambojn, kiujn ili forportis. La knabino estas la kvara albino mortigita en 2008, laŭ la prezidanto de la landa albino-asocio.

Parlamentara enketo montras, ke membroj kaj organoj de albinoj estas vendataj en la regiono kaj ankaŭ en la najbara lando Tanzanio por sorĉaĵoj – kaj kontraŭ grandaj monsumoj. Fiŝkaptistoj kaj orserĉantoj uzas la organojn en diversaj sorĉaĵoj, por ke floru iliaj entreprenoj. Laŭ popolkredo, albinoj estas akvo-dioj, kies organoj plenas je misteroj. Kelkaj homoj kredas, ke albino-sango kuracas aidoson.

La polico jam arestis tiujn, kiuj mortigis la tri antaŭajn viktimojn. Arestitaj estas ankaŭ kvar suspektatoj en la kazo de la lasta mortinto. La provinca prokuroro postulas mortopunon. Intertempe la polico provas protekti la albinojn en aparta kampadejo en la ĉefurbo, el kiu tamen la lasta mortigito eliris, kredante, ke ne plu estas danĝero.

Entute mortis en 2008 tra diversaj landoj de orienta Afriko almenaŭ 27 albinoj, grandparte virinoj kaj infanoj, kaj ĉiuj viktimoj de homaj oferoj.

Jérémie SABIYUMVA



Fiŝkaptistoj kaj orserĉantoj uzas la organojn en diversaj sorĉaĵoj, por ke floru iliaj entreprenoj. Laŭ popolkredo, albinoj estas akvo-dioj, kies organoj plenas je misteroj. Kelkaj homoj kredas, ke albino-sango kuracas aidoson.

Rajto pri libera esprimado?

La rajto pri libera esprimado estas garantiata en multaj ŝtatoj, en Belgio eĉ en la konstitucio (artikoloj 19 kaj 25). Sed tiu leĝo havas amason da esceptoj. Tion spertis Monato-kunlaboranto Petro de Smet kiu en decembro ricevis telefonalkvokon kun la jena mesaĝo: „Se vi ne ĉesas verki en via blogo, ni tuj enkarcerigos vin.” La 69 artikoloj, kiujn li jam verkis ĉefe pri la belga justico (vidu http://www.ipernity.com/blog/petro_desmet/?lg=eo), tamen restas (ĉu provizore?) legeblaj en Interreto. Legantoj de Monato krome povas legi la artikolon *Surrealismo, surrealismo* en la marta numero de 2008, en paĝo 11.

Vintra banado

Bani sin vintre en malvarmega maro, rivero aŭ lago estas ekstreme ŝatokupo de ĉirkaŭ 120 000 finnoj. Se la akvo jam frostiĝis, oni faras truon en la glacieron kaj sin banas. Se la truo fermiĝas pro la frosta vetero, estas uzata elektra kirlilo por teni ĝin malfermita. La ŝatantoj de vintra banado venas al sia glacitruo ĉiutage, aŭ malpli ofte, sed tamen ripete. En bankostumo, kun ĉapo surkape kaj ofte gantoj surmane, ili trempas sin en la akvon kaj rondnaĝas dum kelkaj minutoj. Poste ili elakviĝas fieraj kaj feliĉaj.

Kial?

La malvarmega akvo (temperaturo nula aŭ kelkgrade plusa) akcelas la sekreciacion de streĥhormonoj, malaltigas la sangopremon, igas la haŭton pli elasta, bonhumorigas, donas psikan forton kaj feliĉigan senton de bonfarto, kuraĝo kaj eltenemo. Poste oni eltenas pli facile la ŝarĝojn kaj animan streĉon en la vivo. Iuj diras ankaŭ, ke la glaciakva banado helpas kontraŭ migreno kaj reŭmatismo.

Kie?

La truo por la banado povas esti memfarita: ĉe propra strando aŭ ĉe publika banejo, prizorgata municipo aŭ de klubo de hobiuloj. La finna ĉefurbo Helsinko disponigas pli ol 20 vintrajn subĉielajn banejojn al ŝatantoj de vintra banado. Ĉe la duono el ili apude staras hejtata saŭno, ĉe la aliaj varmigata vestoŝanĝejo. Tamen prefereblas, ke oni varmigu sin en la saŭno nur post la malvarma bano. Unue oni eniru trankvile kaj malrapide la malvarmegan akvon, kies temperaturo ofte estas multgrade pli alta ol tiu de la aero (minusaj gradoj

ĝis 10-20). La uzantoj de la servoj pagas 10-150 eŭrojn.

Kia glacitruo?

La truo mezuras almenaŭ 3 m x 3 m, kaj la akvo devus profundi almenaŭ 1,5 metrojn ĉe la enira ŝtupareto. Se la akvo fluas, estas grave ĉirkaŭi la glacitruon per reto subakva tiel, ke neniu sinbananto subglaciĝu (danĝero de senelirejo, sufokiĝo, hipotermio). La pado al la truo ne estu glitiga: oni surŝutu ĝin per sablo aŭ salo kaj ĝi havu varmigeblan maton ĉe la fino. La enakviga ŝtupareto havas gardrelojn ambaŭflanke. Oni povas uzi elakvigan ŝnuregon kun nodoj por helpi la eliradon el la glacitruo. Ĉiu banejo devas nepre disponi pri savringo kaj ĵeteblo savŝnurego.

Ĉu hobio aŭ sporto? Tion vi mem de-

cidu. Verdire okazas en Finnlando ankaŭ vintraj naĝokonkursoj en subĉielaj banejoj, sed tio estas jam alia afero.

Saliko



RACHEL'S FLICKR



PNTPHOTO

La truo mezuras almenaŭ 3 m x 3 m.



PNTPHOTO

La pado al la truo ne estu glitiga: oni surŝutu ĝin per sablo aŭ salo.

Paŭlo-jaro

Papo Benedikto la 16a proklamis la periodon de la 28a de junio 2008 ĝis la 29a de junio 2009 „jaro de Sankta Paŭlo”. Parenteze, por protestanto tiu epiteto „sankta” sonas iom strange, kvankam la 13a apostolo ankaŭ en protestantismo gravege rolas.

Por multaj Paŭlo estas la vera fondinto de kristanismo. Por aliaj li grave misformis la originajn intencojn de Jesuo mem. Kiel ajn, la fakto, ke li naskiĝis antaŭ 2000 jaroj, instigis la papon al tiu ĉi mondvasta memorado pri li. Laŭ historiistoj Paŭlo ja naskiĝis iam inter 5 kaj 10 p.K.; la ekzakta dato ne estas konata. Kaj ĉar lian morton tradicie la romkatolika eklezio memoras la 29an de junio, kune kun tiu de Petro, tiuj ĉi datoj por la Paŭlo-jaro iel estas devigaj.

Ĉar Paŭlo naskiĝis en la urbo Tarso

en nuna Turkio, ankaŭ en tiu loko oni kunfestas ĉi tiun jaron: la loka ĉefpreĝejo el la 12a jarcento estos je dispono de pilgrimantoj, laŭ decido de la turka registaro, kvankam de post 1943 ĝi oficiale ne plu estas preĝejo. Post 1943 komence oni uzis ĝin kiel tenejon; nun ĝi estas muzeo. Sed por la festo ĝi unu jaron denove funkcias kiel preĝejo.

Ankaŭ sur la insulo Malto oni devas kunfesti ĉi tiun jaron, ĉar sur tiu insulo Paŭlo alteriĝis post ŝiprompiĝo survoje al Romo, kie iun tempon li vivis kiel malliberulo. Laŭ la tradicio li poste mortis martire en Romo, tempe de imperiestro Nerono. La baziliko Sankta Paŭlo ekster la Muroj en Romo staras sur la tradicia loko, kie li estis enterigita. Jen tiu baziliko do estas la tria, ĉefa, loko de la celebradoj.

El la Nova Testamento la plej malnova parto konsistas el kolektaĵo da leteroj de Paŭlo, direktitaj al diversaj kristanaj komunumoj. Li respondas en ili plurajn demandojn kaj donas konsilojn. Poste aldoniĝis kelkaj leteroj de supozeble liaj lernintoj al la kolektaĵo de nun entute 13 leteroj. La kvar evangelioj datiĝas de iom pli poste. Ĉar liaj tekstoj estas tiel fruaj, liaj eldiroj grande influis kristanisman. Paŭlo estas vaste konata pro sia – lingve – komplikega stilo; tio estas unu el la kialoj, ke multaj homoj iom timas eklegi liajn leterojn. Alia problemo estas, ke fojfoje oni kvazaŭ subkonscie konas iajn ofte aŭdatajn interpretojn de diversaj eroj, kiujn tamen ĉe rea legado eblas interpreti ankaŭ malsame. Tiel Paŭlo, ekzemple, dumlonge por multaj estas ege kontraŭvirina teologo, sed aliaj – male – eĉ fojfoje nomas lin la unua feministo de la kristana historio.

Nian internacian publikon mi ŝatus instigi eklegi liajn leterojn por tiamaniere honori tiun unikan personon. En Esperanto ekzistas la tradicia traduko el la komenco de la 20a jarcento fare de anglikanaj pastroj (en la esperantlingva biblio), sed ankaŭ ekzistas pli nova traduko en la serio Oriento-Okcidento de UEA: tiun ĉi mian tradukon mi verkis laŭ pli modernaj tradukprincipoj de la nuna biblioscienco, tiel ke la enhavo fariĝas pli bone komprenebla por nuntempuloj. Kaj en la notoj kaj komentetoj mi provas iom detaligi interesajn trajtojn de la teksto. Espereble tiu ĉi Paŭlo-jaro estos kialo por multaj samtempuloj niaj denove ekkoni liajn verkojn, kiuj ja tiel funde influis kristanisman kaj, pere de tio, la tutan mondon!

Gerrit BERVELING



La baziliko Sankta Paŭlo ekster la Muroj en Romo staras sur la tradicia loko, kie li estis enterigita. Jen tiu baziliko do estas la tria, ĉefa, loko de la celebradoj.

Tage kaj nokte en televido



Dum ok tagoj, de la 5a ĝis la 11a de oktobro 2008, el la baziliko Sankta Kruco en Romo oni dissendis la integran tekston de la biblio. 1200 legantoj, katolikoj, protestantoj, ortodoksiuloj, islamanoj kaj nekredantoj, sin sekvis dum 180 horoj, senpaŭze, krom por momenta fama kanto aŭ muziko, en la deklamado de la tuta teksto.

Ĉio komenciĝis ĉe RAI 1 (Radio kaj televido itala), estis daŭrigata en RAI eduka 2 kaj fojfoje aŭdiĝis ankaŭ ĉe provincaj privataj kanaloj, kiam la laŭvica leganto apartenis al ties komunumo.

En Italio almenaŭ 67 % de la homoj posedas en sia biblioteko integran biblion, sed malpli ol 10 % el ĝi ĉerpas ion meditan.

En profunda nokto iu leginto eliris el la baziliko, kie ĵus li legis la psalmojn 31, 32, 33: „Ĉielaj vortoj skulptitaj en la ŝtono, perloj de saĝeco ili estas”, li komentis. „Jen la temo: homo persekutata de malamikoj, malbonŝanca, vivas inter maltrankvilaĵoj. Ĉiuj konspiras kontraŭ li, bruligitan teron ili faras ĉirkaŭ li. Sed li sin turnas al la Sinjoro (Dio), kiu elaŭdas lian preĝon, prenas lian manon, al li forviŝas la larmojn, lin levas, ree verŝas en lian koron la dignecon de ekzisto spite de la kalumniantoj. Tiam la homo ‘renaskiĝinta’ plengoje invitas la tutan mondon laŭdi la Sinjoron”. Jen la komento de la leginto (ĉu katolika aŭ protestanta, ĉu nekredanta?), noktofunde, pri sia ĵusa sperto al ĵurnalistoj, kiuj lin atendis ĉe la pordo de la baziliko.

Armando ZECCHIN

La Helpanto



La pordoj glit-malfermiĝis, kaj li eniris la lifton. La ununura alia veturanto kontrolis lin, dum li enpaŝis, kaj poste re-mallevis la kapon. La butono por la tera etaĝo jam lumetis, do li nur apogis je la malantaŭa muro, dum la pordoj fermiĝis.

Neniu parolis.

Kiam la lifto haltis, li atendis, ĝis la alia persono eliris, tiam marŝis malrapide el la konstruaĵo en la brilan junian tagon. Starante ekster la pordoj, ĝis la okuloj kutimiĝis al la sunlumo, li pripensis kion fari. Li havis nenian rendezuon por atingi, kaj neniu lin atendis. Li loĝis sola post la morto de sia edzino en la pasinta jaro, kaj liaj filoj loĝis eksterŝtate. Benko antaŭ li en la korto ŝajne vokis lin, do li marŝis al ĝi kaj sidiĝis.

Fonto en formo de kaduceo ŝprucis en orfiŝplena laĝeto antaŭ li. Infanoj ludis ĉe ĝi kaj ĉirkaŭ ĝi. Kiel juna arkitekto, (kiom da jaroj pasintaj?) li helpis dizajni ĉi tiun korton ĉe la universitata hospitalo kiel sian unuan projekton post la kolegio. Super la arboj kaj domoj trans la strato videblis la supro de la Fiŝburna Oficejo, kiu estis unu el liaj lastaj gravaj projektoj, antaŭ ol li emeritiĝis, jam kvin jarojn antaŭe. Ŝajnis al li iom ironie, ke li elektis ripozi ĉi tie, vidante kaj la komencon kaj la finon de sia profesia laboro. Koincido? Eble. Li tion ne kredis.

Li ne rimarkis la etan blankharulon eksidi ĉe la alia flanko de la benko, sed kiam li hazarde rigardis flanken, tie li estis. Li portis netan kompleton kun aŭdace helverda kravato, kvazaŭ peco de la gazono nodita ĉirkaŭ la nuko. Liaj piedoj apenaŭ atingis la teron. La etulo

rimarkis lian rigardon kaj ekparolis.

„Malbonajn novaĵojn?”

Li turnis la kapon for de la etulo.

„Jes. Malbonajn novaĵojn.”

„Mi estas bona aŭskultanto. Ĉu vi volas paroli pri ili?”

Li ne estis kutime parolema kun fremduloj, sed ial li komencis paroli pri siaj problemoj al la eta gnomaspekta homo. Li rakontis pri la hepatito, kiun li ekhavis per pasinta transfuzo, sia malbona koro, kaj la kancero, kiun ili ĵus eltrovis. Pri tio, ke li ne estas kandidato por hepata transdono pro sia malbona koro, kaj ne por kora kirurgio pro sia malsana hepato, kaj pro siaj aliaj malsanoj li certe ne tolerus kemiterapion. Lia kuracisto proponis kurson de „subtena terapio”, kio vere signifas „komfortigi lin, ĝis li mortas”.

Dum li parolis, la etulo nur fojfoje balancis la kapon, aŭ diris, „jes” aŭ „hum” aŭ aliajn kuraĝigajn sonojn, ĝis li finis. Kiam la vort-torento finfine ĉesis, li jese balancis la kapon kaj diris: „Tiuj ja estas malbonaj novaĵoj. Eble mi povas vin helpi.”

Li rerigardis dubeme al li, kaj demandis: „Ĉu vi estas kuracisto?”

„Ne. Almenaŭ, ne precize, sed mi kredas ke mi eble povas helpi vin.”

„Kion vi povas fari, kion la kuracistoj ne povas fari por mi?”

„Diru al mi la veron, kion faras por vi la kuracistoj?” Pro surprizo pri tia demando li silentis dum momento, kaj la malgranda homo tuj daŭrigis, ne atendante respondon. „Ĝuste kiel mi kredis. Viaj kuracistoj proponas, ke vi vivu la mallongan reston de via tempo sub la influo de drogoj, kiuj iom post iom iĝos pli kaj pli senefikaj, ĝis vi finfine mortos, kiel dolorplena, duonfreneza maniulo. Mi promesas nenion, sed mi kredas, ke mi povas fari pli bone ol tio.”

„Do, kion vi proponas?”

Li metis la manon en sian kompleton kaj eltiris etan vitran flakonon. „Jen. Trinku ĝin je dormotempo. Glutu la tuton. Mi kredas, ke ĝi vin helpos.”

„Kio ĝi estas?”

„Tio, kio, mi kredas, vin helpos. Drogherbaj ekstraktoj, kontraŭ-oksidgegantoj, kaj tiel plu. Pli precize mi ne kapablus sciigi vin, sen ke vi multe studus.”

Li malridetis, kuntiris la brovojn kaj demandis: „Kiom da kosto?”

„Neniom.”

„Neniom?”

„Mi senpreze donas ĝin al vi”, la etulo diris formale, etendante la flakonon al li, riverencante.

Li prenis ĝin, kaj kontrolis la donacon. Ĝi enhavis klaran, iomete flavan likvaĵon, kiu fluis viskoze, kiel mielo. Li rerigardis al la malgranda homo. „Kaj kiam mi bezonos pli?”

„Tio sufiĉos, mi kredas. Se ne, mi donos al vi pli. Senkoste.” Li ekstaris, permane gladis sian kompleton kaj rektigis la kravaton. „Mi devas foriri. Bonan ŝancon.” Li turniĝis kaj ekmarŝis for.

„Atendu!” li kriis al li. „Kiel mi trovu vin, se mi bezonos pli da medikamento?”

Li haltis kaj turnis sin al li, ridetante. „Ne zorgu pri tio. Mi vin trovos.”

„Kiel? Mi eĉ ne diris al vi mian nomon.”

La rideto iomete larĝiĝis. „Mi ja trovis vin je ĉi tiu fojo, ĉu ne?” Li turnis sin kaj formarŝis.


Li rigardis refoje al la flakono, kiu kuŝis sur lia manplato. Ĝi fokusigis la sunlumon tiel, ke ĝi aperigis brilan linion da lumo sur lian manon, kiel ora sago, kiu celas lian koron. Li scivolis, ĉu tio estas bona aŭguro, aŭ ne. Li metis la flakonon en la ĉemizan poŝon. „Nu,” li laŭtadiris, „kion mi havas por perdi?”

Neniu respondis.

Kelkajn tagojn poste liaj amikoj kaj parencoj kunvenis ĉe sepultistejo. La rabeno ĉantis funebran kadiŝon per forta, klara voĉo, kiu gvidis la lamentantojn, kiam iliaj propraj voĉoj eble stumblus. En la elegio li laŭdis la vivon kaj atingojn de la mortinto, kaj dankis al Dio, ke Li elektis preni lin pace, sensufere, dum li dormis.

Neniu aŭdis la etan blankharulon, kiu sidis en la lasta vico, diri: „Nedankinde.”

Steven K. SMITH



La tulamora tombejo

Ĉiu esperantisto, kiu konas la literaturon, rekonas la nomon de Karolo Piĉ kaj la titolon de lia romano *La litomiŝla tombejo*. Ankaŭ ĉi tiu eseeto temas pri tombejo, kvankam ne en Ĉeĥio, sed en la irlanda kampara urbo Tulamore. Tiu, kiu promenas en la tulamora tombejo, tie trovos diversajn unikajn interesaĵojn.

Fremdulo eble surpriziĝos, ke multaj tomboŝtonaj surskriboj en la tombejo (kaj aliloke en Irlando) estas en la irlanda (gaela) lingvo. Kutime, la nomo kaj aliaj detaloj pri la forpasinto aperas en la angla, kvankam kelkfoje la epigrafo inkluzivas ankaŭ tradician citaĵon en la irlanda. Fakte, la plej granda monumento en la tulamora tombejo havas tutgaelan surskribon gravuritan en antikvaj irlandaj manuskriptaj literoj, sed tio estas escepto.

Pro tio, ke la Irlanda Respubliko estas precipe katolika lando, granda spaco en la tombejo estas dediĉita al la tomboj de monaĥinoj. Aliloke, kelkaj unuopaj ŝtonoj memorigas pri irlandanoj enterigitaj en Usono, lando, kiu akceptis multajn irlandajn elmigrintojn ekde la Granda Malsato meze de la 19a jarcento ĝis la finaj jardekoj de la 20a.

Kelta kruco

La plej ŝatataj kaj karakterizaj monumentoj konsistas el gravuritaj kolonoj en la formo de antikva kelta kruco, videbla en arkeologiejoj kaj tombejoj en la tuta insulo. Tiu ĉi desegno, kvazaŭ simbolo de kelta kristanismo, havas cirkon super la du brakoj de la kruco.

Post la fino de la unua mondmilito, kaj la samtempa sendependiga ribelo

kontraŭ brita regado, ĝis la estiĝo de pli paca situacio en Nord-Irlando, en la lasta jardeko de la 20a jarcento, irlandanoj, kies familianoj militservis en la brita armeo dum la mondmilitoj, hontis pri la supozata „perfido” de irlanda patriotismo. Pro tio, kvankam miloj da junaj irlandanoj mortis en la militoj (malgraŭ la oficiala neŭtraleco de la Respubliko en la dua), preskaŭ neniuj irlandaj familioj aŭdacis malkaŝi la fakton per tomboŝtono memore al siaj militaj mortintoj.

Tiuj, kiuj mortis dum la irlanda sendependiga milito kaj en la enlanda milito, kiu ĝin sekvis, estis honorigitaj per monumentoj. Tamen, nur preskaŭ fine de la 20a jarcento aperis en irlandaj tombejoj novaj tomboŝtonoj memore al la mondmilitaj mortintoj. Estas strange trovi tiajn surprize novaspektajn tomboŝtonojn kun detaloj pri junaj irlandanoj mortintaj inter 1914 kaj 1918 en t.n. irlandaj regimentoj de la brita armeo.

Ruldomoj kaj tendoj

En Irlando estas pluraj miloj da familioj, kiuj laŭtradicie vivas kiel nomadoj en ruldomoj kaj tendoj, kvankam ili ne estas de cigana deveno. Antaŭe tiu komunumo, angle „tinkers” (stanistoj, kaldronistoj,) gaele *tincéirí*,



De antikva kelta kruco, videbla en arkeologiejoj kaj tombejoj en la tuta insulo, estas kvazaŭ simbolo de kelta kristanismo kaj havas cirkon super la du brakoj de la kruco.

vendis kaj aĉetis ĉevalojn. Moderna socio ne plu bezonas manfaritajn kaldronojn kaj sitelojn, kaj la nomadoj taksas la nomon „tinker” insulto.

Ili nomas sin hodiaŭ „travellers” (vojaĝantoj; gaele: *lucht siúil*). Multaj vivas malfacile, danĝere kaj kelkfoje mizere, flanke de ŝoseoj. Tamen aliaj pli bonstataj nomadoj sukcesas gajni sufiĉe da mono por pli lukse subteni sin. Tiuj lastaj, pasigante la vivon sen fiksita domo, ŝatas imponajn monumentojn post sia morto. Pro tio, kelkaj el la plej grandaj kaj ornamitaj monumentoj en la tulamora tombejo kaj aliloke en Irlando troviĝas sur la tomboj de nomadoj.

La unua nomada monumento en la tombejo pompas el nigra marmoro, kun

granda rando: ĝi estas alta tomboŝtono kun epigrafo en oraj literoj, flank-kolonoj beligitaj per orumitaj floroj, statuoj de la sankta virgulino kaj sanktuloj, floruoj, gravuritaj slabetoj donacitaj de diversaj familianoj, marmora piedpilko sur piedestalo, kaj antaŭa marmora genukuseno kun orumita invito „Stay and Chat” („Restu kaj babilu”).

Glaso da Guinness

La dua monumento trovita estas simila: el nigra marmoro, riĉe orumita, kun aldonaĵo de grandega rozario pendanta sur la tomboŝtono, orumitaj bildoj de kamioneto kaj nomada ĉarumo, kaj en la mezo, sur la marmora planko, piedestalo, sur kiu staras granda glaso da irlanda portero (nigra biero) Guinness [gínes].

Post funebraĵoj, anstataŭ malgrandaj florbukedoj, la nomadoj kutimas lasi sur la tombo grandegajn panelojn el artefaritaj plastaj floroj aranĝitaj en la formo de la nomo, kromnomo, aŭ titolo de la forpasint(in)o. Unu salutas „Grandad Baldy” („Avo Kalvulo”); alia deklaras, en kripligita poŝtelefona ĵargono, „I love u Mum” („Mi amas vin, panjo”).

La irlandaj nomadoj kutime geedziĝas, kiam ili estas tre junaj. Plej patosa tombo estas tiu de juna (30-jara) nomada virino. Simila al la aliaj monumentoj (el nigra marmoro, sed kun multaj gravuritaj memorslabetoj en formo de koroj kaj unu kiel malfermita libro), ĝi informas, ke la forpasintino mortis, naskante infanon, kiu ne supervivis, kaj plie postlasis kvin filojn, kvar filinojn kaj 17 genepojn, plus



nevojn kaj nevinojn. Ĝi atestas, ke la vivo de nomadoj ne ĉiam estas feliĉa, kaj iliaj mortoj ofte estas tragikaj.

Ankaŭ pri la tulamora tombejo eblus verki romanon.

Garbhan MacAoidh
Irlando



Tiuj, kiuj mortis dum la irlanda sendependiga milito kaj en la enlanda milito, kiu ĝin sekvis, estis honorigitaj per monumentoj.

Libroforma enigmo


La reguloj de ĉi tiu speco de enigmo estas la samaj kiel por la kutima enigmo. La solvo kiun ni serĉas estas la vorto de 6 vertikale.

Sendu la vorton antaŭ la 1a de marto 2009 al Flandra Esperanto-Ligo, Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete al enigmoj@monato.net.

Inter la solvintoj Monato elektos tri personojn, kiuj ricevos libron kun 80 diversaj sudoku!



LOUÏSER



Horizontale

1. sufikso, kulpas, trinkaĵo R
2. groteksan
3. azia lando (mallongigo), nocan mamulon, azia lando (mallongigo)
4. insektsience
5. ero R, maljes
6. adverbo, spirgaso R, ne via
7. preskaŭ estantan post ĉiuj ceteraj
8. pronomo refleksiva, reĝa seĝo, eŭropa lando (mallongigo)

Vertikale

1. subite elspiras aero ekscite
2. provizi R, asocio R
3. rondforma kuko R
4. fruktodona skribisto, fari R
5. subita korinklino R, solenejo R
6. la divenota librotitolo
7. ringforma insulo R, maloftega R
8. lumigan stelon, iu litero
9. klano R
10. parto de homa korpo R, adverbo
11. persono kiu esploras R


R = radikvorto

Ĉu vi parolas solresole?

Solresol, la universala muzika lingvo de Jean François Sudre [ja frasuá sidr] (1787-1862), bazita sur la sep tonoj de la solfeĝo, malofte ricevis la atenton aŭ la respekton, kiun ĝi meritas. Tamen, ĝi estis la unua planlingvo, kiu akiris la subtenon de generaloj kaj aliaj potenculoj, famaj sciencistoj kaj komponistoj, internaciaj ekspozicioj, institutoj de kleruloj kaj simile (se ne de amasoj da realaj lernintoj kaj uzantoj), kaj tio por lingvo, unue publike prezentita jam 52 jarojn antaŭ la lanĉo de Volapuko kaj 60 jarojn antaŭ la Unua Libro de Esperanto.

Iom da informo lastatempe haveblis en Interreto, sed dumlonge malfacile estis trovi informojn pri ĝi. Preĉipe, parenteze, en Britio: sufiĉe raraj libroj pri la lingvo ŝajne malaperis en nigran puton for de la bretoj kaj de la ŝtata British Library en Londono, kaj de la Butler-biblioteko de Esperanto-Asocio de Britio.

Nun finfine ni havas per ĉi tiu interesa nova publikaĵo de André Cherpillod la unuan ampleksan elmontron en Esperanto de la universala muzika lingvo de post la dupaĝa resumo de Drezen de 1928/1931 en lia Historio de la Mondolingvo. Malgraŭ la partianaj enkonduko kaj sekcio pri historio, en kiuj Cherpillod tute nenecese emfazadas la superecon de Esperanto, la cetero estas bone organizita kaj objektiva. Li prezentas „plenan analizon gramatikon”, kies ekzemploj fojfoje hante rememorigas pri la Fundamenta Ekzercaro, sed mankas pli longaj tekstoj. Poste li skizas la multajn uzeblajn manierojn uzi la lingvopropozonon: skribe (ne nur per la latina alfabeto; eĉ



Solresol uzas alfabeton el sep simboloj, nome la sep tonojn de la baza solfeĝo, de kiuj venas ankaŭ la (parola) nomo de la lingvo (Sol-Re-Sol).

kiel muzikan partituron), parole, stenografie (per mallongigoj, numeraloj, aŭ speciala skribsistemo), kante, per muzikile, geste, per koloraj lumoj aŭ fuzeoj, kaj per frapoj aŭ bruoj per iu ajn rimedo. (Cherpillod tiucele sugestas interalie kalaŝnikovon!) Kaj fine estas nekompleta, sed ilustra dudirekta vortaro.

Mallonga, sed bona.


Ed ROBERTSON



André Cherpillod: Dore Domilado Solresol (Mi parolas solresole). Eld. La Blanchetière, Courgenard, 2008. 27 paĝoj. ISBN 2906134813.

Prezo ĉe FEL: 3,59 eŭroj + afranko

Salutinda trezoreto



Temas pri zorge prezentita libro kun multaj arabstilaj desegnaĵoj, ankaŭ koloraj. Redaktis ĝin Gerrit Berveling, Michael Cayley kaj Renato Corsetti. Centoj da proverboj, aranĝitaj laŭteme. Sur multaj paĝoj estas, krome, enkadrigitaj anekdotoj proverbecaj. Multaj el la arabaj proverboj similas (eĉ, kelkfoje identas) al la „okcidentaj” proverboj, jam familiaraj al ni. Entute, la proverbokolekto, el kiu povas ĉerpi la literaturo esperanta, multe pligrandiĝis. La sola riproĉo farebla estas pri la tre malgrandaj preslitteroj.

Kiu konas la Proverbaron de Zamenhof, tiu trovos ĉi tiun libron bonvena kunulo por ĝi. Ne timu, ke vi ne komprenos tre arabkulturajn esprimojn, ĉar abundas klarigoj kaj piednotoj por helpi vin.

Resume, salutinda „trezoreto”.

Donald BROADRIBB

Husejn Al-Amily: La trezoro de arabaj proverboj kaj anekdotoj. Eld. UEA, 2008. 137 paĝoj tre forlike gluitaj. ISBN 978-92-9017-101-0.

Porte(b)la Ilustrita Vortaro

Ĉi tiu nova esperanta vortaro de Luiz Portella havas difinojn nur en Esperanto kaj ankaŭ bildojn. Ĝi similas do iomete al PIV (Plena Ilustrita Vortaro). Tamen, ĝi estas A6-formata kaj havas nur 98 paĝojn, kaj multe malpli kostas ol PIV. Ĉu Poŝa Ilustrita Vortaro? Ĉu Pagebla Ilustrita Vortaro? Fakte oni nomas ĝin „Ilustrita OREL (Oficiala Radikaro Esperanta por Lernanto)“.

Kion ĝi celas? Laŭ la Antaŭparolo, ĝi servu kiel instruilo: lernante Esperantan vorton per Esperanta difino, „oni kreas rapidan vojon inter la koncepto kaj la vorto en Esperanto, sen la deĵoro de la traduko“. Mi trovas tiun teorion tre kredinda – ankaŭ mi kredas, ke oni klopodu pensi en la lernata lingvo – sed restas la problemo, kiel oni difinu la plej oftajn vortojn de la lingvo, uzante nur tiujn oftajn vortojn, tiel ke lernanto efektive komprenu la difinojn. Ĉu la aŭtoro sukcesis en tiu malfacila tasko?

Sed antaŭ ol provi respondi tiun demandon, mi volas starigi alian demandon, kiu estas kvazaŭ kvizo por vi, la leganto, por kontroli viajn „ĝeneralajn sciojn“: kiu gvidis la atakojn en Nov-Jorko je la 11a de septembro 2001? Notu vian respondon sur slipon; poste mi donos la ĝustan respondon, kaj vi povos vidi, ĉu vi scias pli bone ol la aŭtoro de ĉi tiu vortaro!

Ilustrita OREL havas 2656 kapvortojn (PIV2002 havas 46 000). Ĝuste la plej oftaj vortoj estas ofte ankaŭ la plej malfacile difineblaj, speciale kiam oni disponas nur tiujn vortojn por verki la difinojn. Do, kaŝu per via mano la postan alineon kaj provu diveni, kiujn vortojn oni celas per jenaj difinoj:

1. agema, laborema.
2. eta botelo por kelkaj celoj.
3. firme certigi.
4. grado de grandeco.

5. grava societo.
6. libervola, senkontrola.
7. miri pro beleco aŭ supereco.
8. precizaj indikoj por atingi iun aŭ ion.
9. sin vidigi.
10. societo pri iu temo.
11. taŭgigi ion.
12. uzi la orelojn.

Jen la solvoj:


1. aktiva.
2. ampolo.
3. aserti.
4. amplekso.
5. asocio.
6. arbitra.
7. admiri.
8. adreso.
9. aperi.
10. akademio.
11. adapti.
12. aŭdi (ne aŭskulti).

Se vi trovis tion facila, verŝajne, vi estas sperta pri enigmoj. Pripensu, tamen, ke lernanto de Esperanto devus kompreni la difinon, ne jam konante la celitan vorton.

Per tiuj ekzemploj mi ne volas montri, ke la aŭtoro fuŝe difinis; mi eĉ ne pretendas, ke eblas plibonigi la difinojn. Mi volas nur montri, ke priskribi la signifon de vorto estas malfacile.

Krom priskribi la signifon per vortoj, la aŭtoro disponas du aliajn ĉefajn rimedojn. Unu estas la ĉirkaŭ 520 bildoj. Nu, bildo tre taŭgas por klarigi kelkajn vortojn, ekzemple „araneo“, sed preskaŭ tute ne helpas por klarigi aliajn, ekzemple „aperi“. Alia rimedo estas la uzado de „scienca nomo“. Ekzemple, la difino de „alaŭdo“ estas „birdo (Alauda)“.

Cetere, ĉi tio ne estas la unua provo



krei unulingvan Esperantan vortaron surbaze de la Baza Radikaro Oficiala: en 2001 aperis Baza Esperanta Radikaro de Wouter Pilger. Avantaĝoj de Ilustrita OREL super tiu libro estas la eta formato, la favora prezo kaj la bildoj.

Mi apenaŭ trovis erarojn en Ilustrita OREL, sed mi notas, ekzemple, ke „ŝi statas laca” (p. 8) ne estas normala lingvaĵo, kaj ke „la tuto de armiloj” ne estas bona difino de „armo”. Cetere, en la ĝenerala uzado la objekto de „adopti” malofte estas homo, do eble ne sufiĉas difini nur la sencon „alpreni iun kiel sian propran filon aŭ filinon”.

Dum temas pri eraroj, mi respondu la kvizdemandon: la atakojn en Nov-Jorko je la 11a de septembro 2001 gvidis Muhamad Atta, kaj mi mencias tiun ŝajne tute senrilatan fakton, ĉar sur paĝo 10 de Ilustrita OREL oni klopodas klarigi la korelativojn (nomante ilin tamen „pronomoj”) per aro da respondoj al KIdemandoj: Kie? En Usono. Kiel? Per aviadiloj. Kiom? Ĉ. 3000 mortoj. Ktp. Rimedo tre originala, sed eble malbon-gusta aŭ eĉ ofenda por iuj. Por mi la ĉefa problemo estas, ke ĉe „kiu” staras „Osama bin Laden”. Nu, estas vere, ke la

usonaj amaskomunikiloj kulpigis lin tuj post la atakoj, sed Osama mem asertis, ke li eĉ ne estis informita pri la atakoj. Li ne havis motivon por mensogi, kaj oni ne havas motivon por ne kredi lin. Efektive, en 2006, reprezentanto de la usona federacia polico FBI diris publike, ke FBI havas „nenian bonan atestaĵon por ligi Bin Laden kun 9/11”. Osama ja estas en listo de homoj serĉataj de FBI, sed pro atakoj en Afriko en 1998, ne pro „9/11”; kontrolu mem ĉe www.fbi.gov, se vi volas. Ĉu la aŭtoro de Ilustrita OREL intence disvastigas miton, aŭ ĉu li mem estas viktimo?

Resume, mia opinio pri Ilustrita OREL estas, ke ĝi estas bela libreto, kiu verŝajne bone vendiĝos, ankaŭ pro la favora prezo, kaj verŝajne entuziasmigis kelkajn lernantojn, sed ĝia utilo kiel vortaro estas limigita, ne ĉar la aŭtoro malbone faris ĝin, sed ĉar la uzado de unulingva vortaro kun komencantoj estas malfacila afero.

Se la kreintoj de Ilustrita OREL volas plu okupiĝi pri leksikografio, kaj mi ja instigus ilin daŭrigi, mi humile proponas jenajn konsilojn. Unue, oni facile povus forigi kelkajn vortojn. En tia vortaro

apenaŭ necesas ekzemple: adepto, akrido, alaŭdo, ankro, aperturo, apro, assembleo, ... Due, oni pripensu duobligi aŭ triobligi la grandon per aldono de multaj ekzemploj. En la nuna versio preskaŭ tute mankas ekzemploj. Mi havas tamen teorion (averto: mi estas nenia spertulo pri instruado de lingvoj!), ke ofte estas pli facile lerni frazeron aŭ tutan frazon ol unuopan vorton. Lernante frazon, oni lernas plurajn vortojn kaj ankaŭ la manieron uzi ilin. (Ekzemple, kiel oni uzu la verbon „aparteni”? La difino en la nuna verko tute ne mencias la prepozicion „al”). Do, se oni donus multajn trafajn ekzemplojn (sed ili devus esti trafaj), eble oni multe helpus lernantojn. Trie, kaj laste, ... oni forigu la mencion pri la kara Osama!

Edmund Grimley Evans

Luiz Portella: Ilustrita Oficiala Radikaro Esperanta por Lernanto. Baza Radikaro Oficiala de Akademio de Esperanto kun difinoj. Pli ol 500 bildoj. Difinoj nur per radikoj, kiuj estas difinitaj. Eld. Pentuvio, Braziljo, 2008. 98 paĝoj. ISBN 978-85-60661-05-3.

Prezo ĉe FEL: 2,49 eŭroj + afranko.

RESPONDORAĴTO

Mi ne estas atisto

Nur hodiaŭ mi trovis la tempon, por skribi al vi mian malkontentecon koncerne la recenzon, kiun vi publikigis en *Monato* (2008/10, (p. 23), pri mia broŝuro *Verbes transitifs, verbes intransitifs*. Ke la recenzanto ne aprecis mian broŝuron, li plene rajtas. Precipe, se li kapablas verki pli bonan pri la sama temo. Sed li ne rajtas misfamigi min, deklarante, ke „la aŭtoro, ŝajne, es-

tas ‘atisto’”, kion mi rigardas ne nur kiel krenaĵon, sed ankaŭ kiel simplan insulton. Se, antaŭ kraĉi ion ajn malfavoran pri mi, la recenzanto iom penus legi miajn ceterajn verkojn, li certe konvinkiĝus, ke „atisto” mi tute ne estas, ĉar plurfoje mi detale kaj ĝisfunde kritikis la „atistmon”. Sed pri mi li videble scias nenion.

Plie, li montras sian kompletan nescion pri la afero, kiam li raportas,

ke – laŭ mi – „estas eraroj en la *Fundamento* kaj en la Biblio”. Se li havus elementan scion pri la temo, li sciус, ke la eraroj en la *Antaŭparolo de la Fundamento* (kaj ne en la *Fundamento* mem) estis antaŭ longe notitaj de Waringhien kaj de Kalocsay. Ĉu Waringhien kaj Kalocsay estas „atistoj”???

André CHERPILLOD

AFRIKO

Burunda futbalo profesiiĝas

La estraro de Burunda Futbala Federacio volas profesiigi siajn membrojn per la helpo teknika, financa kaj materiala de la Federacio Internacia de Futbal-Asocioj (FIFA). La projekto estis akceptita de FIFA dum 5-taga renkontiĝo de la trejnistoj, prezidantoj kaj ĝeneralaj sekretarioj de la futbalklubo de unua divizio de Burundo en kadre de la kampanjo „Gajni en Afriko kun Afriko”. Inter la trejnistoj kaj spertuloj de FIFA, kiuj ĉeestis la renkontiĝon, estis la eksfutbalisto de Kameruno Jean Onguene Manga. En dokumento nomita la „Bujumbura Deklaro”, la partoprenintoj decidis fari ĉion eblan por finpretigi rekomendojn al FIFA por profesiigi la burundan piedpilkudadon.

Ekde novembro 2008 Burunda Futbala Federacio starigis komitaton, kiu sekvas la efektivigon de la mezuroj, kiuj troviĝas en la „Bujumbura Deklaro”. Tiu ĉi rekomendas al ĉiuj futbalklubo havi jurajn statutojn, kiuj pruvos, ke reale la klubo ekzistas jure kaj morale kaj tio ekde 2009.

La kluboj devas havi bonan organizon, administran sidejon kun minimumaj iloj kiel komputiloj ligitaj al la reto, telefono, faksilo kaj personoj, kiuj kapable funkciigos la sidejon. Tiuj iloj permesos al la kluboj facile kaj efike labori.

Pri financoj la Burunda Futbala Federacio devigos al ĉiu klubo de la unua divizio disponigi almenaŭ bankokonton kaj regularon rilate la financon mastru-



JÉRÉMIE SABIYUMVA

La klubo devas havi sian propran grundon, spertan trejniston kaj la nombro de teamanoj devas esti ne pli ol 25, por ke ĝi estu akceptita en la federacio burunda.



JÉRÉMIE SABIYUMVA

madon. La klubo devas havi sian propran grundon, spertan trejniston kaj la nombro de teamanoj devas esti ne pli ol 25, por ke ĝi estu akceptita en la federacio burunda. La deklaro provizas la instruadon de trejnistoj, juĝantoj kaj aliaj bezonataj personoj por atingi la celon. „Burundo estas riĉa je personaj kaj materialaj rimedoj kaj oni bezonas nur aktivigi kaj motivigi ilin por atingi la celon,” konkludis Lydia Nsekera, prezidanto de la Burunda Futbala Federacio kaj Paul Saviote, Moustapha Bakayoko kaj Jean Onguene Manga nome de FIFA, kiuj subskribis la deklaron.

Jérémie SABIYUMVA



JÉRÉMIE SABIYUMVA

La kluboj devas havi bonan organizon, administran sidejon kun minimumaj iloj kiel komputiloj ligitaj al la reto, telefono, faksilo kaj personoj, kiuj kapable funkciigos la sidejon.

anoncetoj

La Verda Stelo, <http://tetrapentos.over-blog.com/> enhavas 3 partojn: 1) Tetrapentos, 2) Stelo, 3) La Ora Stelo. La tria parto estas tradukita al pluraj lingvoj; mi emus doni pli da tradukoj al tiu parto. Se tio interesas vin, iru al <http://tetrapentos.over-blog.com/article-16071723.html>

Se vi tradukos tiun paĝon al via naci-lingvo kaj sendos tiun tradukon al mi, mi pagos vin sendante al vi unu ekzempleron de La Ora Stelo (aŭ Verda Stelo, se vi elektas la ludon, kiu enhavas ĉiujn pecojn verdajn). Antaŭ ol komenci tradukon, bonvolu skribi al jacques.ferroul@laposte.net por scii, ĉu neniu jam komencis traduki.

Vizitu IperNity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 1250 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozsef.nemeth@gmail.com.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Jak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR
aere 43 EUR
rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA,
UFE, EAB, SEF kaj
dudeko da aliaj landaj
perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

MORTO De ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...

Anna Löwenstein



MORTO De ARTiSTO

Paĝoj: 624; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008

Serio Stafeto n-ro: 33

ISBN: 978-90-77066-39-3

Prezo ĉe FEL: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

